
HEJS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORO:
S-RO MIGUEL A. ALTUNA

**Nro. 92**
**Jan. - Feb. 1975**

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª
Telefono 24 44 92 - BILBAO-5



EK AL LA NOVJARA VOJO!

# ENHAVO


Projektoj por la nova jaro.............2
Mia edzino hontigas min.............3-4-5
La Nobel-premio de Fiziko(Astronom)5-6-7
Nuna estraro............................7
Post 15 jaroj.........................8-9
Mortdanĝero por Donana..........10-11-12
Notoj kaj Korespondа servo.............12
Ivo Lapenna:pri la demokrateco..13-14-15
Distraĵoj..............................16


La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de HEJS, escepte en okazo de oficiala komunikoj;ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro;do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Saluton,geamikoj!En viaj manoj troviĝas la unua ĉi-jara numero.Sed,jen!Ĝi estas pli dika ol kutime,ĉu ne?Prave,ĉar,se vi legis la enhavon,vi povis rimarki ke 16 paĝoj atendas vian legadon!

Vi povas demandi ĉu ni freneziĝis.Ni ĉiam plendas pro nekunlaboro en la redaktado,niaj financoj ne kontentige marŝas,kaj nu,la solvo ŝajne estas pligrandigo de la paĝnombro!

Ni klarigu:pluraj el vi reagis al nia peto, pagante 150 ptojn kiel jarkotizon.Krome,lastatempe pluraj paĝoj estas skribataj de santanderaj verkemuloj,krom la ĉiama kunlaboro de Sro Serrano el Sabadell.Ni nur esperas,por elteni tiun ĉi rekordan nombron,ke simila verkemo aperos en pliaj membroj.Ni sukcesu!

# PROJEKTOJ POR LA NOVA JARO

Feliĉe,en tiom da paĝoj,malmulte da spaco restas por nia interna uzo.Kiel ĉiam,ekzistas projektoj kaj iniciatoj por novjara agado.Kelkaj el ili ja ne estas novaj,sed tio ne gravas.

1ª)HEJS-tendaro:Ĉi-jare,jes.Ĉi-kune vi havas la aliĝilon.Do,ne necesas pluaj komentoj.

2ª)Varbado:En 1974 nia membraro tute ne kreskis. Ni petas al vi aktivi,paroli pri HEJS al viaj konatuloj.Ĉiu varbinto ricevos ekzempleron de "Kontakto",la revuo de TEJO.HEJS-membroj estu ankaŭ TEJO-membroj.

3ª)Konkurso por hispanlingvaj sloganoj pri E-o: Oni premios la plej taŭgan frazon laŭ la juĝantaro.Limdato,la 1ª de novembro.1ª premio,1000 ptoj.Pliaj premioj,konsistantaj en libroj,estas aljuĝeblaj.Kiel vi scias,la fota konkurso havos verdikton la 1-an de februaro.Ankoraŭ vi povas partopreni.

4ª)Helpo al la E-lernado en hispanlingvaj landoj Tiu ĉi nia pasintjara projekto ne efike efektiviĝis.Malfacila kontakto kun tieaj esperantistoj kaj ne tro sanaj financoj iom malhelpis.Tamen, ni sendis inform-kaj lern-materialon al sudamerikaj studentoj en Budapest.

5ª)Kunlaboro kun Regiona Agado de TEJO:Preskaŭ sensignifa,sed ja io estas.Ni sendos nian bultenon al aktivuloj en senmovadaj landoj.Momente nur al Senegalio kaj Portugalujo.Aparte ni menciu la aktiviĝon de la portugaloj,al kiuj ni pretas oferi ĉiun eblan apogon:

6ª)Regularo:Por havi ian legiĝon de nia situacio,ni akceptis projekton de Regularo,prezentita al HEF-estraro por aprobo.Ni danku la verkintojn de la bazaj projektoj prezentitaj:Juan Azcuénaga kaj Juan Ramón Guinón.

7ª)Informado de la membraro:Ni klopodos pli ofte kaj komplete informi vin pri la agadoj,atingoj kaj malsukcesoj.Ni dediĉos paĝo(j)n de nia revuo al tio.

# MIA EDZINO HONTIGAS MIN

Mi ne scias, ĉu vi kara leganto troviĝas en sama situacio kiel mi. Mi ne scias kara amiko, ĝu vi estas fraŭlo aŭ edziĝinta . Se vi estas fraŭlo, atentu bone pri la ĉi-subaj konsiloj, kiujn mi donas al vi, ili estas eltiritaj de mia sperto dum mia edza vivo. Se vi estas edziĝinta kaj ĉi tiu situacio, kiun mi rakontas al vi ne troviĝas en via geedzeca vivo, evitu ke ĝi eniru en vian ĉiutagan neston kaj se hazarde vi estas tiel malfeliĉa kiel mi, vi fariĝis mia kompatinda amiko.

La afero estas grava, terura, hontiga, en ĉi tiu moderna vivo, en kiu la futbalo fariĝis "nia ĉiutaga pano". Jes, la kaŭzo, ke mia edzino hontigas min estas la futbalo. Ne estas io alia. Pensu dece, bonvolu!!.

Viziti niajn familianojn kaj amikojn estis unu el miaj plej grandaj plezuroj. Mi diras estis, ĉar tio verŝajne ne plu okazos. Kio estas la kaŭzo, la motivo?. Mi fidas je vi, malfermas mian suferantan koron, temas pri la analfabeteco de mia edzino pri futbalaĵoj.


Mi ne bezonas klarigi al vi, ke kiam mi renkontas familianojn aŭ amikojn, la ĉefa temo de nia konversacio estas la futbalo. Kiom mi babilas, kiom ni ĝuas la vivon - parolante pri tiu moderna kaj alloga sporto, la futbalo. Sed vi imagu ke kiam nia interparolado estas pli interesa, aperas iu kiu demandas, kio estas la maksimuma puno?. Nu, tio estas kion faras mia edzino. La sekvon vi povas supozi; ĉiuj rigardas min kompateme, ili ja pensas ( sed ili ne kuraĝas diri al mi) kian edzinon vi havas!!, ĉu vi ne hontas je ŝi¿. Mi ĉiam evitas paroli pri futbalo, sed pri kio paroli?.

Mia edzino nenion komprenas pri futbalo. Ŝi ne scias kio estas la angula ekludaĵo (corner), ŝi ne scias kiuj estas la avangardaj ludantoj, ŝi ne scias kio estas flanka ekludaĵo (saque lateral), ŝi ne scias por kio servas tiuj blankaj streketoj kiuj troviĝas en la terenludo. Ŝi scias nenion. Ŝi nur komprenas, ke tiu teamo, kiu atingis pli da goloj estas la venkinto.

Sed vi ne pensu, ke ĉio estas perdita. Ŝi tre interesiĝas al tiu "mirakla akvo" kiu tuj resanigas la vunditajn futbalistojn. Tiom ŝi interesiĝas al tiu akvo, ke ŝi pensas ĝin akiri por forigi miajn reŭmatismajn dolorojn.

Mi ne bezonas skribi longe, ne uzi gravajn argumentojn por vin konviki pri la hontigo, kiun faras mia edzino al mi. Ĉu en tiuj kondiĉoj, ĉu kun tiu menso de mia edzino mi povas kunveni kun aliaj homoj?. Ne, tute ne.

Mi jam intencis eduki, modernigi mian edzinon por ke ŝi komprenu almenaŭ ion pri futbalo, sed ŝi nenion kapablas lerni, ŝi estas vera krucvorto, kiam mi klarigas al ŝi la diversajn "kazojn" de la futbalo. Ŝi nur interesiĝas al tiu akvo por mia reŭmatismo.



En plena apogeo de la futbalo, kiam tiu sporto malfermis la inteligentecon de kiu ajn civitano, mia edzino restadas en la plej granda analfabeteco. Mi jam perdis multajn el miaj amikoj. Aliaj salutas min de malproksime, ili evitas nin, kaj mi eĉ estas dankema al ili, ĉar tiamaniere min ne suferigas la embarasoj.

Miaj familiaj renkontiĝoj ne estas tiel oftaj kiel antaŭe, kaj kiam ni parolas pri futbalo – ni ja ne posedas aŭtomobilon – mia amata edzino ĉiam (kiel oni diras hispane) metas la "ŝkruron". Miaj familianoj diras al mi: estu pacienca, la malfeliĉo ankoraŭ povus esti pli granda !!.

Ĉar en la vivo, la bono kaj la malbono, ambaŭ donas famon, ni ankaŭ fariĝis famaj. Ofte promenante surstrate mi vidas akuzantan fingron, kiu diras: jen la virino, kiu nenion komprenas pri futbalo.

Mi finas ĉi tiun gravan raporteton pri mia ĉiutaga vivo kun la jenaj konsiloj: se vi estas fraŭlo, atentu bone pri via estonta "duona oranĝo", ke ŝi estu moderna, ke ŝi komprenu ĉion pri la futbalo, kaj se vi estas edziĝinta kaj via edzino komprenas nenion pri tiu populara sporto, venu kaj ni ploros kunkune.


Luis Serrano Pérez
Sabadell

# LA NOBEL PREMIO DE FIZIKO

## Unuafoje por la Astronomio

Ĉi jare, La "Nobel-premio" atingis anglan astronomian laborgrupon.

Tiu Honoro estis por M. Ryle kaj kunlaborantoj. M. Ryle kiel gvidanto de tiu laborgrupo kaj ankaŭ ĉar li estas inteligenta instrumentisto, liaj kunlaborantoj havas la meriton (tiu ĉi grupo de kunlaborantoj estis aliflanke gvidita de A. Hewish) esti la unuaj homoj kiuj eltrovis la tiel nomatajn "pulsars" (radiopulsantaj fontoj). En Julio de 1.967 A. Hewish, eltrovis, per radioastronomiaj esploroj, objekton eksterordinare grandan, tiu radiofonto ("pulsar"), dissendas nedaŭrajn radioelektrajn impulsojn ondforme kun kronometra precizo; la frekvenco de tiu ĉi signalo estas inter 1/10 sek. kaj 2 sek.— la eraro troviĝas en parto en 10 milionoj—. En samtempa laboro de A. Hewish kaj kunlaborantoj ( S. J. Bell, J.D.H. Pilkinton, P.F. Scott kaj R. A. Collings) kiu aperis en la revuo Nature (Nature, 217-Feb. 1.968), unuafoje aperas la vorto "Pulsar" por radiofonto kies signalo daŭras 3/10 sek. kun periodo de 1,337 sek. — (malpli ol unu sekundo kaj duono). Tiu signalo estis trovita en bando de radiofrekvenco de 2700 megacikloj. Tiam Ryle, Hewish kaj kunlaborantoj opiniis ke tiuj signaloj estis dissendataj ekster la Tero de estaĵoj nekonataj (ili baptis tiujn hipotezajn estaĵojn kun la nomo LGM " little green men" (angle). Aliparte ili dubis ĉu tiuj signaloj devenas de la propra Tero—signaloj reflektitaj de la Luno—, sed finfine ili forigis tiujn hipotezojn favore al pli reala ideo: La radiofontoj estas neŭtronaj steloj— treege densa materio (dek milionoj da tunoj po kuba centimetro)—,



antaŭviditaj teorie jam de antaŭ sufiĉe da tempo- (1.932) de L. Landaŭ (Sovetunio) W. Baade- (1.934) kaj G. Volkoff.

Estas necese la helpo de la termodinamiko, la meĥanstatistiko, la ĝenerala teorio de la relativeco kaj la nuklea fiziko samtempe por povi bone priskribi la neŭtronajn stelojn, sed ankoraŭ ni devas diri ke tio estus eble nur per kohera disciplino kies disciplineroj estas tiuj menciitaj. Oni opinias, ke la neŭtronaj steloj estas restaĵoj—— la lastaj paŝoj en la evoluo de iu stelspeco——de tiuj kiuj atingis la staton kiun oni konas kiel "blankajn manojn" (stelspeco), kiuj pro gravita premado atingas grandecon kompareblan al tiu de la Tero (la radio de la Tero= 6.400 km.).

En la lastaj dudek jaroj la Astronomio surprize antaŭeniris, la fizikaj metodoj en ĉi tiu scienco eligis la laboron en nevidebla regiono de la lumo, tiamaniere aperis la radioastronomio, la X-radioastronomio kaj la infraruĝa astronomio. Aliflanke estas interese scii ke la atmosfero de nia planedo estas travidebla por ondoj kies longeco estas inter unu milimetro kaj tridek metroj, do estas eble fari bonajn observojn per teleskopoj kiuj funkcias en tiu regiono de la elektromagneta spektro.

Alia grava aspekto de ĉi tiuj malkovroj estas tiu rilate al ekonomio, M. Ryle mendis kaj ricevis 80 milionojn da pesetoj por konstrui radioteleskopon, kiu ebligis ricevi stelradiosignalojn el steloj kies potenco estas tro malforta ( 25-oble malpli ol la ordinaraj steloj). Tiamaniere la astrofizikistoj povas studi eventojn okazintajn antaŭ milioj da milionoj da jaroj——kiam ankoraŭ nia pla-

nedo ne ekzistis—, tio estas, ili povas "vojaĝi" (se oni permesas ĉi tiun sprimformon) al la pratempoj. Alia teleskopo estis konstruita de tiu grupo el Anglujo, ĉi foje estis radioteleskopo kies valoro atingis la kvanton de 300 milionoj da pesetoj ĝi posedas ok parabolformajn antenojn, kies diametro estas 12,5 m., ili etendiĝas longe en antikva fervojo (5 km. longa), kunigita al tiu teleskopo estas komputilo, kiu permesas enhavi kaj kontroli rapidege la informadon, ĝi estas tradukata al fotografaĵoj kies kvalito estas komparebla al tiu de la tradiciaj optikaj grandaj teleskopoj. Rimarkinda estas la fakto ke la scienca esplorado, en kiu ajn branĉo, bezonas grandan ekonomian subtenon, tiu apogo, pro sia graveco, nur povas esti realigata ĉu de la registaroj, ĉu de la kapitalo de la industrio ĝenerale. Do, ŝajnas ke la scienca esploro nur povas funkcii bone en tiuj landoj kie tiu ekonomia apogo estas reala, efektiva fakto.

## NUNA ESTRARO

L. Trujillo
La Laguna-Tenerife

Iom ŝanĝiĝis la konsisto de nia estraro. Kiel ĉiam, dankon al la foririntoj kaj kuraĝon al la novuloj. Ekde la komenco de la jaro la estraro estas:

Prezidanto kaj redaktoro de HEJS-revuo:
Miguel Angel Altuna, el Bilbao
Vicprezidanto pri rilatoj kun TEJO:
Miguel Gutiérrez, el Santander
Vicprezidanto pri rilatoj kun la delegitoj:
Pedro Pérez, el Bilbao
Sekretario: Laura García, el Bilbao
Vicsekretario: Mercedes Castro, el Bilbao
Kasisto: José Miguel Fernández, el Bilbao
Estraranoj: Juan Ramón Guinón, el Barcelona
Leandro Trujillo, el La Laguna
Conchi Lezama, el Bilbao
Susana Santos, el Bilbao

**IJK** La Internacia Junulara Kongreso okazos en Fredericia (Danlando) de la 19ª ĝis la 26ª de julio. Ni havas aliĝilojn, do, petu ilin al ni se vi deziras partopreni. La 1ª limdato finiĝas la 31-an de januaro.

2a

# post 15 jaroj

Komence de 1971 nova grupo transprenis la gvidadon de Hispana Esperanta Junulara Sekcio (HEJS) kaj tial nia Sekcio translokiĝis al Bilbao, en kies Esperanto-grupo ankoraŭ troviĝas la sidejo de HEJS. Ne facilajn cirkonstancojn devis alfronti tiuj kuraĝaj gejunuloj, kiuj ricevis arĥivon kun gravaj mankoj, kapitalon (ĉu 5.500 pesetojn?) kaj organizon -ĉu vere tiu ekzistis?- post kelkjara krizo. Do, ŝajnis malfacila kaj ne glata la estonteco de HEJS, kiu de tiam ĝis nun havis du prezidantojn kaj, almenaŭ, ses estrarojn.

La komenco postulis ilian entuziasmon kaj laboron por reorganizi la Sekcion, sed baldaŭ montriĝis grava plibeligo de "HEJS", kiu ŝajne pliaspektas revuon ol bulteno. Kvankam ofte aperis korespondpetoj kaj malgraŭ kelkfojaj porfilateliaj artikoloj, Koresponda Servo kaj Filatela Sekcio, kiel tiaj, neniam funkciis.

Cetere, la kongresoj en Alicante kaj Vigo signifis gravan paŝon por la varbado kaj progresado de la Sekcio, same kiel estis speciale interesaj por la junularo. Dum tiuj kongresoj, ĝuste dum HEJS-kunvenoj, esprimis la estraro siajn projektojn por vigligo de la junulara esperantista movado; jen kelkaj: Ekspozicio de bildkartoj, fotoj kaj poŝtmarkoj; IIIa SeMed en Alicante (1973); propagando en "HEJS"; speciala tago por la junularo dum la naciaj kongresoj; eldono de adresaro (plenumita en 1974). Pliaj projektoj aperis komence de 1973: Literatura kaj Varba konkursoj, enketo; kaj pliaj dum la nacia kongreso en Madrid: okazigo de HEJS-kunveno en Zaragoza (1974) kaj de regionaj kunvenoj. Kaj la nova prezidanto kaj estraro proponis, en 1974, ankaŭ kelkajn ideojn: Helpo al la lernado de Esperanto en hispanlingvaj landoj, pligrandigo de la membraro, konkurso por kovrilpaĝaj fotoj, membrokarto kaj HEJS-tendaro.

Verŝajne ĉiu el vi scias ke plimulto el tiuj

projektoj ne efektiviĝis. Tio eble povas konduki al vi atingi nean opinion pri la gvidantoj de nia Sekcio, sed la kaŭzo sendube troviĝas en tiu manko de bezonata kunlaboro, malgraŭ la daŭraj helpvokoj de la diversaj estraroj. Tamen, mi devas aparte emfazi kaj substreki la atingojn: sanaj financoj (ja ili pli malpli kvarobligis la kapitalon de 1970), aĉetado de tajpilo, regula aperado de la revuo (gravaj klopodoj por plibonigo de la enhavo kaj plibeligo de la aspekto estas daŭre enkondukitaj), eldono de adresaro, kalendaroj (por 1974 kaj 1975), membrokartoj (donaco de Petro Nuez), kaj la Helpo al la lernado de Esperanto funkcietas per sendado de vortaroj kaj informiloj al la Budapesta Universitato kaj "H E J S" al Senegalio kaj Portugalio (kunlabore kun Regiona Agado de TEJO). La Sekcio havis, fine de 1973, 232 membrojn, rekorda cifero en nia historio. Ĉu ĉio ĉi, eĉ tiuj troaj projektoj, ne meritas nian gratulon?

Restas al mi ankoraŭ tuŝi du tre interesajn aferojn: la rilatoj kun Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj kun Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Bedaŭrinde, jam de la kongreso de Vigo, niaj rilatoj kun HEF distanciĝis kaj anstataŭ ni ricevi ilian helpon estis ni kiuj finance helpis ilin por akiro de Sekretariejo (HEJS donacis 1.000 pesetojn en 1970 kaj 500 en 1973 por tio). Ankaŭ laste akriĝis tiuj rilatoj, pri kio grandparte kulpas, verŝajne, la maldiplomatiaj agoj flanke de HEJS. La pozitivaj klopodoj enkadre de TEJO kaj nia kunlaboro al ĝiaj celoj montras kontraŭan vizaĝon al tiu de niaj rilatoj kun HEF. Ankaŭ pruvas tion la lastaj atingoj en ties komitato, kie nun estas 4 hispanoj. Kaj tio estas por ni plia respondeco, kio samtempe devigas nin al plia kunlaboro.

Du personoj ekvigligis nian Sekcion, José FARIÑAS, nia gaja prezidinto, kaj María José MORAN, nia efika kaj aktiva sekretariino. Ili ambaŭ kulpas pro la grava sukceso de la varbkampanjo dum la kongresoj de Alicante kaj Vigo, same kiel pri la transdono de HEJS al nova laborema prezidanto, Miguel Angel ALTUNA.

JUAN AZCUÉNAGA

## mortdanĝero por

Ega aktualaĵo

# DOÑANA

Estas nekredeble, sed bedaŭrinde estos vero se la nunaj agoj en kaj ĉirkaŭ ĝi daŭros, ke nia plej fama kaj monde konata natura parko, tiu de Doñana, malaperos. Tamen, jam pasintjare mortis 50.000 birdoj, pro la uzo de ĥemiaĵoj por eviti insektojn, pestojn, ... en apudaj rizejoj.

Kiam ankoraŭ Afriko kaj Eŭropo estis unusola kontinento, antaŭ 16 milionoj da jaroj, naskiĝis Doñana. La Tero tremiĝis kaj faldiĝis, naskiĝis la Betika montamaso kaj inter la nova montaro kaj la Bruna Montaro iĝis granda valo kie fluas Guadalquivir, aŭ granda rivero de la araboj. Ĉio alia estis Natura kreo.


La donostia societo "Aranzadi" aranĝis la vojaĝon, en 1953, de valladolida biologo, José Antonio Valverde. La celo estis enmeti ringojn al la birdoj. De tiam li agas kaj batalas por Doñana. En 1960 li bezonis organizi internacian monkolekton por subteni sian entreprenon: konstrui "Biologian Domon". Fine, en 1969, li atingis la pinton per la kreo de la Nacia Parko kaj Doñana ŝajne povus esti konservata.

Nun Doñana estas parto, grava parto, de la natura hispana bieno, kaj tial mi atentigas vin pri la nepra konservado de ties riĉaĵo. Se ni hodiaŭ detruas ĝin, neniam ni povos tion rekonstrui. Tie loĝas pli ol 300 malsamaj bestoj, kelkaj unikaj en la mondo. Sed tie kunfandiĝas tri naturaj medioj: dunoj, mediteranea arbaro kaj marismoj -marismoj dum vintra vetero kaj stepoj dum seka vetero.

Sed la avido kaj ambicio de konstruentreprenistoj atingis la ĉirkaŭaĵojn de Doñana. Turistoj simple deziras sunon, maron kaj belan naturon. Tial naskiĝis la loĝturoj de "Matalascañas". Nur tio ja rompis la ekologian ekvilibron: sufiĉas konsideri

ke la akvoprovizadon oni faris je la kosto de la Parko mem. Sed estus sufiĉa alia motivo: la turoj tute rompas la naturan pejzaĝon. Sed jam oni projektis alian urboplanadon, "Las Marismillas", kaj oni pretendas obstine ke la ŝoseo Huelva - Cádiz randos tute la sudan parton de la Parko, fermante al ĝi la naturan eliron en la maron.

Tamen, laŭ ŝajne, ĉio ĉi ne sufiĉas kaj nun ektransformiĝas 40.000 hektaroj kiuj formas la nordan landlimon de Doñana. IRYDA ja sekigis simile la lagetojn La Janda (Cádiz), La Nava (Palencia), Antela (Orense) kaj Cospeito (Lugo), kaj la rezultoj estas nekonataj, kvankam verŝajne ne estas pozitivaj. Nun estas sekigante, per la plano "Almonte-Marismas", la marismojn kiuj ĉirkaŭas Doñana. La propra plano mencias ke "la influo de tiuj transformiĝoj ne estas bone studita ..." Sed, tamen, la maŝinoj jam klopodas plenumi tiun sekigadon.




Verŝajne, sekigi tiujn marismojn, kies akvo inundas la terojn de Doñana, okazigos sekigi la rezervon. Du projektoj klopodas solvi tiun problemon, sed neniam la ekologiaj kondiĉoj povos esti kiel la nunaj. Mencii al vi ĉiujn nunajn projektojn en la ĉirkaŭaĵoj de Doñana, kiuj ŝanĝigos la nunan staton, estas neeble pro spacomanko, kvankam lastatempe oni klopodas trovi argumentojn por nei domaĝojn aŭ danĝerojn pro tiuj projektoj kiuj okazigos biologian

katastrofon.

Nu, super ĉiuj homaj ambicioj kaj interesoj devas ankoraŭ resti la kolektiva intereso, eĉ ankaŭ la konservado de la natura medio. Tial urĝas garantii la kontinuecon de Doñana. Kaj ni devas ne forgesi ke la Parko sen protektanta ĉirkaŭaĵo, pli malpli du kilometrojn larĝa, ĉesos ekzisti. Ĉu ne sufiĉas la kompenso transdoni al estontaj generacioj unu el la malmultaj redutoj de la origino mem de la kreo? -

JUAN AZCUÉNAGA

## DEZIRAS KORESPONDI...

-18-jara pola knabo, lernanta hispanan, kun hispanaknabino inter 16 kaj 20 jaroj, pri ĉiuj temoj. Oferas someran gastigadon al la korespondantino.

Tomasz Chmielik,
Nadleśnictwo Świdnik, 21-040 Świdnik (Pollando)

-Sep E-lernantoj kun la tuta mondo. Skribu al
Danfa Thiarno,
B.P.4004, DAKAR (Senegalio)

-38-jara teknikisto, kun hispanlingvaj junulinoj. Li parolas hispanan.
Erwin Wasche,
Untergriesbach 3,889 AICHACH bei Augsburg (F.R.Germanujo)

-Juna fraŭlo, mekanika inĝeniero, kaj juna fraŭlino, kemia inĝeniero. Skribu al
Z. Nagowski,
Racławicka 9/13, 85-041 BYDGOSZCZ (Pollando)

-29-jara fraŭlo, kun fraŭlinoj inter 25 kaj 30 jaroj, pri ĉiuj temoj.
Jesús Pérez Caballero,
Apdo.39 ARUCAS (Gran Canaria)(Hispanujo)

NOTO.-Ĉiu esperantisto vizitonta la Kanariajn Insulojn mendu turismajn prospektojn en kiaajn nacia lingvo (ne en esperanto) ĉe
Jesús Pérez Apado,39 ARUCAS (Gran Canaria)

La surprizaj hamburgaj okazintaĵoj kaj la epokfara decido de D-ro Lapenna denove starigis la demandon pri la demokrateco en UEA. Sed, ĉar li mem aktive parto prenis konstrui la modernan UEA, ni povas konsideri ke la nunaj strukturoj estas rezulto de liaj ideoj kaj spertoj.

Okaze de la 50-a datreveno de la fondiĝo de UEA, kies Jubilea Festprogramo okazis en la kadro de la 43-a UK en Mainz, li diris: "Ĉiu el ni libere diru sian opinion pri la metodoj aplikotaj, ke ni vaste kaj profunde diskutu, eĉ longe diskutu, ĉiujn aspektojn de nia agado, sed post tiuj diskutoj kaj post kiam ni faras laŭ plej demokrata vojo decidojn, ni ĉiuj observu ilin kaj per ĉiuj niaj fortoj helpu la realigon. Nur tiamaniere ni iros antaŭen. Nur tio estas la vera senco de nia interna demokrateco, kiu ne estas imagebla sen memdisciplino. Movado militanta kiel la nia, movado militanta sur la kultura kampo, povas progresi ne per sterilaj disputoj, sed per grandaj fortostreĉoj por plenumi demokrate voĉdonitajn decidojn, kiuj samtempe signifas libervole akceptitajn sindevigojn."

En sia artikolo "Kelkaj kaŭzoj de nekontentiga progresado", D-ro Lapenna ankaŭ traktis kune demokratecon kaj disciplinon. Kaj tiam li skribis: "Demokrateco, interalie, inkluzivas egalecon de la konsistaj unuoj, ĝeneralan akcepton de difinitaj bazaj reguloj de konduto devigaj por ĉiuj, liberan opiniesprimadon pri diskutataj demandoj kaj observadon de decidoj, formitaj laŭ la principo de plimulto. Ĉiu el tiuj ideoj estas sintezo de nombro da rajtoj kaj devoj." Kaj: "Sen tiu interna disciplino demokrateco tutsimple ne povas funkcii: ĝi transformiĝas en anarkion, en kiu ĉiu agas laŭ sia bontrovo kaj kapricoj en ĉiujn eblajn direktojn kun la fina rezulto, ke la tuto estas paralizita."

Sed 1964 estis jaro de elektoj por la Komitato de UEA kaj D-ro Lapenna denove tuŝis la demandon de demokrateco skribante: "Universaleco sen demokrateco havus nenian valoron. En UEA la demokrateco espримiĝas ne nur en la principo de la Statuto, ke la respekto de la Homaj Rajtoj estas esenca kondiĉo por ĝia laboro, sed in-

teralie, ankaŭ en la konsisto de ĝiaj organoj kaj en la maniero, laŭ kiu ili estas elektataj kaj funkcias."

Dum la malferma parolado de la 53-a UK (Madrid, 1968), D-ro Lapenna prezentis "Kelkajn fundamentajn tezojn". Tiam li diris: "Asocio reprezentanta mondan movadon kaj pretendanta universalecon en horizontala (teritoria) kaj vertikala (faka) sencoj ne povas kontentige funkcii, se ĝi ne kunligas en sia organiza strukturo internaciecon kaj demokratecon kun la plej alta grado de efikeco." Kaj li ripetis tiujn vortojn en sia artikolo "La senco de la nunaj elektoj".

Novaj elektoj alproksimiĝis kaj D-ro Lapenna skribis alian organizan lecionon: "Demokrateco kaj memdisciplino en UEA". Tie li komencis tiel: "En la koncepto de demokrateco estas implicitaj almenaŭ du fundamentaj ideoj, el kiuj fontas ĝiaj ceteraj konsistaj elementoj: libereco en esprimado de opinioj kaj regulo de plimulto en farado de decidoj. Ili estas aplikataj en ĉiuj demokrate organizitaj socioj kaj ĉiaspecaj kolektivoj, sed tio neniel signifas, ke la konkretaj aplikoj estas identaj. Ekzistas grandegaj diferencoj kaj koncerne la formojn, en kiuj demokratioj funkcias (ekzemple, senpera aŭ reprezenta demokratio) kaj en rilato al la grado de demokrateco (ekzemple, la vasteco de fakta partopreno en la decidado)." Kaj poste li admonis: "Por la glata funkciado kaj por la prosperado de UEA, multe pli gravas la libervole akceptita memdisciplino, ol ĉiuj ajn formalaj garantioj de la Statuto kaj reguloj celantaj sinprotekton de la Asocio kontraŭ eraroj kaj mispaŝoj. Nenio povas helpi, se forestas bonvolo kaj sincera deziro agi konkorde por realigi la celojn konforme al la Statuto kaj la aliaj bazaj organizaj dokumentoj de UEA. Alivorte, sen memdisciplino kiel esenca komplemento de demokrateco, neniu demokrata organizaĵo povas ekzisti."


Tamen, malgraŭ lia aserto en tiu artikolo ke "nuntempe la fina sorto de la Asocio troviĝas en la manoj de la tuta membraro", ĉar "laŭ la nuna Statuto de UEA, la tuta membraro partoprenas en ĝenerala voĉdono ĉu rekte, ĉu pere de aliĝintaj landaj asocioj", poste li skribis ke estas urĝa organiza tasko "amendi la Statuton cele al plia demokratigo por vastigo de la rajtoj de individuaj membroj". Laŭ mia opinio, la individuaj membroj havas en la nuna Statuto de UEA nenian rajton:

la Delegitoj estas nomataj de la Landa Asocio interkonsente kun la ĉefdelegito de UEA (ankaŭ nomata de la Landa Asocio, sed interkonsente kun la Ĝenerala Sekretario de UEA) kaj nur en regiono kie ekzistas minimume 10 individuaj membroj, ili rajtas okazigi kunvenon kaj mem elekti sian Delegiton. Kaj en tiu reprezenta demokratio ekzistanta en UEA, la individuaj membroj elektas n e n i u n komitatanon, ĉar nur estas la Delegitoj kaj Landaj Asocioj. Do, por la ellaborintoj de tiu Statuto la realaj subtenantoj de UEA estis nur la Delegitoj kaj Landaj Asocioj. Kaj mi ne legis proteston pro tio, eĉ D-ro Lapenna faris, krom sia lasta artikolo en "Esperanto", nenion por rajtigi la individuajn membrojn.

Ŝajnas al mi ke mi ne eraras se mi resumas lian starpunkton pri la demokrateco tiel: 'Libereco en esprimado de opinioj pri diskutataj demandoj kaj observado de decidoj formitaj laŭ la principo de plimulto. Nenio povas helpi, se forestas bonvolo kaj sincera deziro agi konkorde, ĉar sen interna disciplino demokrateco tute simple ne povas funkcii'.

Aliflanke, "la lasta, senkompromisa vorto", de D-ro Lapenna ne povas esti konsiderata kiel demokratia: "Estu absolute klare: aŭ oni plu deziras 'havi Lapenna' sen abscesoj sur la organismo de UEA, aŭ oni havos la abscesojn sen mi". Frazo kiu ne estis oportuna, laŭ mia opinio.

JUAN AZCUÉNAGA



KRUCVORTENIGMO: solvo al tiu aperinta en nia revuo n-ro 90.
Horizontale: 1ªodoro - i-2ª bubo - al-3ª se - neĝo 4ª e - akra 5ª ridi 6ª v - e - ovo 7ª ie - j - et .
Vertikale: 1ª observi 2ª due - i - e - 3ª ob - ade - 4ª ronki - j - 5ª o- er - o - 6ª aĝa - ve 7ª ilo- ot .

## MUZIKA PAĜO

De nun, vi havas paĝon tute dediĉita al la muziko . Vi men povas ĝin redakti per sendado de artikoloj , ideoj , opinioj , kaj ĉiaspecaj temoj ene de la muzikmondo.

La redakcio havas la esperantan tekstojn de tre konataj kantoj , kaj certe publikigos kelkajn el la plej interesaj.



## futbalo kaj korbopilkado en esperantujo

Pasintjare estis fondita la sporta asocio de malagasaj esperantistoj cele praktiki futbalon kaj korbopilkadon. Ĉiu ludanto estas ano de la lingvo de Zamenhof, kaj sur la ludkampo, esperanto estas deviga por ĉiuj . La du teamoj pretas matĉi kun alilandaj sportaj asocioj.

(Laŭ informoj el sinjoro Rabevazaha)